Mi kisis ŝiajn manojn. Ili estis malvarmegaj kiel la krucifikso, kiun ili tenis. Mi ĵetis min sur ŝian koron — sed ĝi ne batis.

Mi staris tre mirigita, dum la servistoj laŭte ploris.

La maljuna servisto, kiu konis mian patrinon ankoraŭ kiam ŝi estis infano, diris fine al mi: „foriru, ŝi mortis“.

Mi diris: „ne kredu ĝin, Johano, ŝi dormas nur kaj ŝi vekigos tuj kiam ŝi ekscios, ke mi estas tie ĉi!“ Kaj mi parolis ree al ŝi, — sed vane.

Mi estis preskaŭ senkonscia kaj miaj larmoj fluis torente. „Kion tio ĉi signifas?“ mi ekkriis malespere. La maljunulo diris: „kara sinjorideto, ekrigardu: ŝi mortis, ŝi estas malvarmega kaj ŝia koro ne batas plu!“

„Ho, ŝi mortis!“ mi ekkriis „ŝi ne konas min, ŝi ne amas min plu!“ kaj mi falis en la brakojn de la maljunulo.

La trian tagon la mortintino estis enterigata kaj oni permesis al mi vidi

ŝin, ankoraŭ unu fojon, en la ĉerko. Mi estis tiam pli trankvila. Iuj diris, ke ŝi estas en la ĉielo kaj mi estis konvinkita, ke mi ankoraŭ mortos, sed kiam oni najlis la ĉerkon kaj forportis ĝin el la domo, kiam oni mallevis ĝin en tombon kaj ĵetis sur ĝin teron tiel multan kaj tiel malvarman kaj malsekan, tiam mia doloro aperis ree kun grandega forto.

La homoj, kiuj rabis al mi la patrinon kaj entombigis ŝin, ŝajnis al mi malamikoj.

Poste kiam ili estis metintaj ŝin en tombon, mi restis tie longatempe, muta pro doloro kaj maĝojo, ĝis kiam mia gubernisto vokis min al la domo. Alveninte tien ĉi, mi genufleksis antaŭ la krucifikso, kie ŝi instruis min preĝi, kaj mi preĝis fervore al Dio: igi min baldaŭ morti ankoraŭ.

Tradukita el la lingvo itala de

Geo. C. Hodgson

Melbourne (Australio).



Otwarcie filji „P. T. E.” w Siedlcach.

Malfermo de filio de „P. E. S.” en Siedlce.

Dnia 13-go grudnia odbyło się oficjalne otwarcie oddziału naszego towarzystwa w Siedlcach.

Na tydzień już przedtym na wszystkich ulicach widniał duży afisz w trzech językach (ros., pol. i esp.), zawiadamiający o otwarciu towarzystwa Esperanckiego i zapraszający mieszkańców miasta do udziału w tej uroczystości.

Nasi towarzysze w Siedlcach uczynili wszystko możliwe dla powodzenia tego pierwszego organizacyjnego i jednocześnie propagandystycznego zebrań. Zgromadzili oni dużą ilość okazowego materiału, zdołali zainteresować wybitniejszych przedstawicieli mia-

La 13-an de decembro okazis oficiala malfermo de la filio de nia societo en Siedlce.

Jam semajnon antaŭe sur ĉiuj stratoj pendis bela granda afiŝo en tri lingvoj (pola, esperanta kaj rusa) sciiganta pri la malfermo de societo esperantista kaj invitanta la loĝantojn de la urbo al partopreno en ĝi.

Niaj samideanoj en Siedlce faris ĉion eblan por la sukceso de tiu ĉi unua organiza kaj samtempe propaganda kunveno. Ili kolektis grandan amason da montrinda materialo, sukcesis interesigi la plej eminentajn re-

sta i przygotowali bardzo ciekawy porządek dzienny.

O godz. 6-ej wiecz. w dużej sali miejscowego Towarzystwa Muzycznego zebrało się prawie 100 osób z miejscowej inteligencji. Posiedzenie zagał D-r Szabelski, prezes towarzystwa lekarskiego, wyjaśniając w kilku słowach cel zebrania i witając przybyłych z Warszawy gości pp: A. Grabowskiego, D-ra Leona Zamenhofa i T. Matuszewskiego. Następnie zaprosił na przewodniczącego p. Grabowskiego, który przywołał na asesorów D-ra Ostrowskiego i prof. Zbiecia.

W dłuższym przemówieniu p. A. Grabowski zapoznał zebranych z ideą Esperanta, dotknął jego dziejów w Polsce i w gorących słowach zachęcał zgromadzonych do wspólnej pracy na rzecz Esperanta. Po p. Grabowskim zabrał głos D-r Leon Zamenhof, który wyjaśnił potrzebę języka międzynarodowego i dowiódł bezzasadności argumentów, wygłaszanych przeciw tej potrzebie. P. Wierzbicka, pierwszy pionier naszej idei w Siedlcach, odczytał nadesłane listy z pozdrowieniami i telegramy, między innymi telegram od D-ra L. L. Zamenhofa.

Na zakończenie wieczoru pan Wierzbicka wygłosił szczegółowe sprawozdanie o kongresie Drezdeńskim, które obudziło duże zaciekawienie wśród obecnych. Niestety, z powodu przeszkód technicznych przedstawienie obrazów niknących z kongresu nie powiodło się zupełnie.

Wyniki tego pierwszego posiedzenia w Siedlcach były bardzo pomyślne. Zapisano się do towarzystwa przeszło 50 osób—wszyscy ze sfery inteligentnej i wpływowej miasta.

Do zarządu weszły następujące osoby: D-r Szabelski, p. Wierzbicka—asesor farmacji, p. Radliński—dyrektor szkoły, pani Barszczewska—przełożona pensji, D-r Ostrowski, prof. Zbieć i p. Jaszczuk.

Zarząd zamierza wkrótce rozpocząć kursa jęz. Esperanto. P. Radliński oraz pani Barszczewska przyrzekli wprowadzić stałe wykłady Esperanta do swych

prezentantów de la urbo kaj pretigis tre interesan tagordon.

Je la 6-a horo vespere en la granda salono de la Muzika Societo kolektiĝis preskaŭ 100 personoj el la loka inteligentularo. La kunvenon malfermis D-ro Szabelski, la prezidanto de la loka kuracista societo, kiu en kelkaj vortoj diris pri la celo de la kunveno, kaj salutis la alvenintajn el Varsovio gastojn S-ron A. Grabowski, D-ron Leonon Zamenhof kaj S-ron T. Matuszewski. Li invitis prezidi la kunvenon S-ron Grabowski, kiu alvokis, kiel asesorojn, D-ron Ostrowski kaj Prof. Zbieć.

En pli longa parolado S-ro Grabowski diris pri la ideo de esperantismo, ektuŝis ĝian historion en Polujo kaj per varmaj vortoj invitis la ĉeestintojn al la komuna laboro por Esperanto. Post S-ro Grabowski parolis D-ro Leono Zamenhof, kiu priparolis la necesecon de lingvo internacia kaj montris la senbazecon de argumentoj kontraŭ tiu lingvo. S-ro Wierzbicka, la unua pioniro de nia ideo en Siedlce, tralegis la alvenintajn telegramojn kaj gratulajn leterojn interalie la telegramon de D-ro L. L. Zamenhof.

En la fino de l' kunsido S-ro Wierzbicka tralegis detalan raporton pri la kongreso en Drezdno, kiu elvokis grandan intereson inter la ĉeestintoj. Bedaŭrinde pro teknikaj malhelpoj la prezento de la lumbildoj el la kongreso ne sukcesis.

La rezultato de tiu ĉi unua kunsido en Siedlce estis tre sukcesa. Enskribiĝis en la societon pli ol 50 personoj — ĉiuj preskaŭ el la pli inteligenta kaj influa sfero de la urbo.


En la komitato estis elektitaj la sekvantaj personoj: D-ro Szabelski, S-ro Wierzbicka, asesoro de farmacio, S-ro Radliński, direktoro de gimnazio, S-ino Barszczewska, direktorino de lernejo por knabinoj, D-ro Ostrowski, Prof. Zbieć kaj S-ro Jaszczuk.

La komitato intencas baldaŭ komenci kursojn de Esperanto. S-ro Radliński kaj S-ino Barszczewska promesis enkonduki specialajn konstantajn kursojn en siajn lernejojn. Oni jam nun povas antaŭvidi la rapidan estontan

szkół. JuŜ dziś moŝna przewidzieć przyszły szybki rozwój sprawy naszej w Siedlcach. Od siebie ŝyczymy nowemu oddziałowi „P. T. E.” najpomyślniejszych rezultatów. Jesteśmy pewni, ŝe pod kierunkiem osóbow, które wzięły ster w swoje ręce w Siedlcach, nasza sprawa w tym mieście nie tylko nie upadnie, lecz będzie się rozwijała szybko, jako piękny przykłađ dla wszystkich innych miast, w których Esperanto zaczyna dopiero się zaszczepiać.

progreson de nia afero en Siedlce. Nia flanko ni deziras al la nova filio de „P. E. S.” plej sukcesajn rezultatojn. Ni estas certaj, ke sub la gvidado de la personoj, kiuj prenis en la manojn la direktilon de nia afero en Siedlce, nia ideo ne sole ne mortos, sed kreskos rapide, kiel belega ekzemplo por ĉiuj aliaj urboj, en kiuj Esperanto komencas nur inokuligi.

Polaj Esperantistoj, imitu la belan ekzemplon de la urbo Siedlce!



Letero de Prof. D-ro Wilhelm Förster

(El „Germana Esperantisto”. Decembro“).

Ĉiuj esperantistoj legos kun intereso la sekvantan gravan leteron per kiu S-ro Prof. D-ro Wilhelm Förster (Geheimer Regierungsrat), klarigas al demandanto la kaŭzon de sia ekŝigo el la Delegitaro. Kiel oni scias, tiu fama scienculo, eksdirektoro de la Berlina observejo, estis honora prezidanto de la Delegitaro, sed jam de longe ne kaŝis sian malaprobacion pri la konduto de la Idistoj *). Precipe kun granda intereso legos la esperantistoj de ĉiuj landoj pri la intencoj de Prof. Förster rilate al enkonduko de internacia kalkulsistemo bazita sur Esperanto. Tiu, kiu konas la famon de Prof. Willh. Förster en la tutmonda sciencularo, tuj

komprenos la gravecon de tiu entrepreno kaj la grandan utilon, kiu rezultos de ĝi por Esperanto.

Westend-Charlottenburg, Nov. 1908.

Tre estimata Sinjoro!

Respondante Vian ŝatindan leteron de la 4-a nuna mi sciigas Vin, ke mia partopreno en la Esperanta movado konsistis en tio, ke mi estis ano de internacia komitato, kiu devis okupi sin pri kritika esploro de la plej gravaj, ĝis nun ekzistantaj sistemoj de lingvo internacia.

La pasintan aŭtunon, tiu ĉi komitato rekonis Esperanton, kiel la plej taŭgan ĝis nun ekzistantan helplingvon. Samtempe la komitato, sen intenco tuŝi la esencan kernon de la lingvo, rekomendis kelkajn reformojn, per kiuj oni kredis atingi pli rapidan kaj ĝeneralan disvastigon de Esperanto.

Sed la komitato, aŭ plibone la komisiono elektita de ĝi, ne sukcesis akiri la nepre necesan konsenton de la estraro de la jam tiel disvastigita esperanta organizo por tiuj reformoj, kiujn la tuta Esperantistaro, kun tre malmultaj esceptoj, ne rigardas kiel plibonigojn.

Sed anstataŭ en konsidero de tiu komprenebla rezisteco de la tiel entu-

*) Prof. Baudouin de Courtenay tiel skribas en la lasta numero de „Espero (10 — 11) pri la kaŭzoj de disfalo de l' Delegacia Komitato. „La tro akra starigo de l' demando pri la reformoj donis tre nedeziratajn konsekvencojn. La fama natursciencisto-filozofo Prof. Ostwald ekŝigis interalie ankaŭ pro tio, ke S-ro Couturat deziris krei kvazaŭ novan „Netuŝeblan Fundamenton”. Mi mem ekŝigis *fakte*, kyankam ankoraŭ ne oficiale, unue pro manko de tempo, due ĉar laŭ mia opinio agado de l' komitato estas malĝusta kaj sencela”. Fakte do la Delegacia Komitato jam cesis ekzisti kaj uzado de ĝia nomo por privataj celoj—estas nur simpla trouzo.

ziasma movado, konsenti al tio, ke oni klopodu enkonduki la reformojn iom post iom, la komisio preterpasante la taskon donitan al ĝi de la komitato kaj kontraŭ la volo de eminentaj membroj le l' komitato alprenis rilate al la estraro de la esperantista movado kritikeme superan sintenadon kaj provis disvastigi mem reformitan, kaj eĉ laŭ la ekstera aspekto esence ŝanĝitan lingvon, kiun oni laŭvice nomis „Ido“, „Ilo“, „Reform-Esperanto“, „Esperanto simpligita“ ktp., kvankam la esperantistoj ne konsentis kun la uzo de la nomo Esperanto kaj kvankam la aldonoj: „Reform“ kaj „simpligita“ kontraŭdiras la konvinkon de preskaŭ ĉiuj esperantistoj.

Tia agadmaniero instigis min, ne nur fordoni la honoran prezidantecon, sed ankaŭ ekŝigi el la Komitato, ĉar en tiuj procedoj mankas, laŭ mi, ĉiu sociala saĝeco kaj mi trovas ilin nur

taŭgaj por krei konfuzon kaj meti en danĝero la progresojn atingitajn post jardekoj da longaj laboroj.

Mi mem intencas tre baldaŭ okupi min per ĉiuj fortoj pri iniciado de ĝenerala internacia reformo de la kalkulado, kiu en la plej multaj lingvoj (kaj precipe en la germana) prezentas tiom da malperfektaĵoj. Tiu kalkulumetodo, bazita sur Esperanto, estus enkondukata en la lernejojn de ĉiuj landoj apud la kalkulado en nacia lingvo kaj iom post iom uzata ĉie en la interrilatoj kaj en la tekniko.

Tio ĉi estus malgranda sed ekstreme grava komenco, kiu tre klare kaj ĝenerale komprenigus la grandegan plifaciligon alportotan en la vivon de plena, komuna helplingvo, sen tro grava enpaŝo sur la teritorion de naciaj lingvoj.

Altestime

(subskribita) *Prof. Wilhelm Förster.*

NEKROLOGIO.

D-ro Valienne.

Ree el niaj vicoj foriris unu el la plej eminentaj kunbatalantoj de nia ideo.

D-ro Valienne, nia unua kaj sola originala romanisto, mortis la 1-an de decembro 1908 jaro. Li forlasis tiun ĉi mondon dum la plej intensa laboro por nia afero. Li ŝajne antaŭsentis tiun ĉi rapidan katastrofon, ĉar li en la lasta tempo laboris mirinde senlace kaj fruktoporte. Li kvazaŭ deziris rekompenci la mallongecon de sia laboro per multobligita ĝia intenseco.

D-ro Valienne naskiĝis la 19-an de novembro 1854 en Saumur, urbo apartenanta al la departemento Maine-et-Loire en Francujo. Li frue perdis sian patron. Dekdujara infano, li fariĝis jam memstara homo. Li finis siajn universitatajn studojn en la urbo Compiègne. Kiel li mem rakontis, de la frua junaĝo li sentis ian fortan inklinon al la literaturo. En tiu periodo li

verkis unu volumon de poezio: „Entre quinze et vingt ans“. Estante tamen homo neriĉa, li oferis sin al la medicino.

Pri Esperanto D-ro Valienne komencis interesiĝi nur en 1903. Entuziasmigita de la unua momento por tiu ĉi lingvo, li provis traduki laŭverse du kantojn de Eneido, sed estante tro okupita de sia klientaro, li ne povis dediĉi sufiĉe da tempo por nia ideo. En Aprilo 1905 ekfrapis lin subite kruela malsano, kiu malebligis al li por ĉiam kuracistan praktikadon. De mateno ĝis vespero li restis kvazaŭ alforĝita al apogseĝo. Tiu stato daŭris kelkajn monatojn. Por sin iomete distri en tiu ĉi kontraŭvola ripozo, li decidis daŭrigi studadon de Esperanto, kaj kiel li skribis mem, li trovis en ĝi sian plej grandan konsolon. Dum tiu ĉi tempo li finis la tradukon de *Eneido* kaj komencis la tradukon de Ovidiaj *Metamorfozoj*, du gravajn verkojn, kiuj sendube eternigos la nomon de ilia tradukinto en la esper-

anta literaturo. Resaniginte iom, D-ro Valienne oferis la tutan sian tempon ekskluzive al Esperanto. Oni povas diri, ke la tradukinto de Eneido estis nia plej fruktoporta esperanta verkisto. Jen estas rezultato de lia mallonga sed mirinde riĉa 3-jara laboro sur la kampo de nia literaturo: 1) „Kastelo de Prelongo“ (515 paĝa originala romano); 2) „Ĉu li?“ (447 paĝa originala romano—vidu la 11-an N^o de „P. E.“); 3) „Evolucio de la religia ideo“; 4) „Por kaj kontraŭ Esperanto“ (dialogo); 5) „Ido kaj Esperanto“. Krom tiuj originalaj verkoj, kiuj faris la nomon de l' mortinto fama en la esperantistaro, li lasis ankoraŭ grandan nombron da tradukitaj verkoj, inter kiuj aperis jam: 1) „Eneido“ de Virgilio (la tuteco); 2) „Metamorfozoj“ de Ovidio; 3) „Manon Lescaut“ de Abato Prevost; 4) „Kapriĉo“ (unuakta komedio); 5) „Oni nenian pri io devas ĵuri“ (triakta komedio)—ambaŭ de Alfred de Musset; 6) „Paco kaj milito“ de D-ro Ch. Richet; 7) „Aventuroj de Telemako“ (en presado) de Fenelon; 8) „La martiroj“ (en presado) de Chateaubriand kaj kelkaj aliaj.

La lastan jaron D-ro Valienne sentis sin iom pli bone kaj eĉ ĉeestis kun tuta sia familio en nia kvara kongreso. Interparolante kun mi en Drezdeno, li rakontis pri jam komencitaj de li novaj laboroj por Esperanto. Bedaŭrinde la sorto decidis alie.

D-ro Valienne lasis edzinon S-inon Valienne, kiu estas jam ankaŭ konata en nia literaturo per siaj esperantaj verkoj kaj kelkajn infanojn, kiujn sen-

dube memoras la ĉeestintoj de nia kvara kongreso.

Nian plej koran kondolencon al lia estiminda familio. P. E.

Edward K. Harvey.

Kun granda malĝojo ni eksciis pri la morto de nia konata fervora samideano Edward K. Harvey. La varsovianoj sendube memoras la modestan tre simpatian amerikanon, kiu vizitis nian urbon post la tria kongreso. Neniu povis antaŭvidi, ke tiu ĉijuna, energiplena vivo rompiĝos tiel rapide.

S-ro Edw. Harvey mortis la 27-an de oktobro en 27-a jaro de sia vivo. Li estis en la lasta tempo instruisto en la blindlernejo „Perkins Institute“, kaj fervore laboris por la propagando de Esperanto inter blinduloj. Dank'al liaj penadoj Esperanto estis enkondukita en „Mass. Institute of Technology“. Li multe helpis en la arango de la kongreso Esperantista en Chautauqua; li laboris por nia afero ĉiam mallalite, sed senĉese kaj mirinde fruktoporte. Por la 27-a de oktobro li preparis specialan parolon pri Esperanto en Bostona publika biblioteko. La neatendita morto trafis lin ĝuste tiun tagon! „Multe ni ploras, skribas lia amiko J. Twombly, pro lia forigo: ĉiu, kiu renkontis lin, ĉu Esperantisto, ĉu ne, perdas unu el la plej surteraj belaĵoj,—modestan lojalan amikon!“

Ni kredas, ke ĉiuj esperantistoj egale plioloros la rompon de tiu ĉi mallonga sed bela vivo. P. E.

AL NIAJ ITALAJ SAMIDEANOJ.

Terura katastrofo trafis la Sudan Italujon. Tertremo, ne konata ankoraŭ en la historio, detruis la belajn kaj florantajn ĉirkaŭaĵojn de Sicilio kaj Kalabrio. Miloj da vivoj falis ofere en la brakoj de l' furia kosma potenco. La doloro de Italujo resonis eĉ en la koroj de ĉiuj homoj. Polujo sentas tiun ĉi doloron pli forte ol multaj aliaj, ĉar Italujo ĉiam partoprenis kore en malfeliĉoj de nia lando. Akceptu do nian koran kondolencon, italaj samideanoj!

Redakcio.

La Redakcio de „P. E.“ malfermas liston de oferdonoj por la malfeliĉaj oferoj de la terura katastrofo en Italujo.

Ludoviko L. Zamenhof, altoro de Esperanto, **50 fr.** La Administracio de „P. E.“ **10 rb.** Seminariano el Vloclawek Franciszek Rawicki **50 kop.** Seminariano Roman Kmiecik **50 kop.** Presejo de L. Biliński kaj Maślankiewicz **3 rb.** Kolektita la 7/1 de kelkaj esperantistoj **5 rb. 25 k.**

LUDWIK ZAMENHOF.

D R O G A .

LA VOJO.

Tra densa mallumo briletas la celo
Al kiu kurage ni iras,
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l' sorto, nek mokoĵ de l' homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kurage kaj ne flankigante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniām lacigas
Pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas
Ni semas kaj semas konstante.
„Ho, ĉesu!” — mokante la homoj admonas, —
„Ne ĉesu, ne ĉesu!” — en kor' al ni sonas:
„Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
Se vi paciencie eltenos”.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton, kaj, repurigataj,
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!

Nur rekte, kurage kaj ne flankigante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

Nasz cel, ku kŝoemu daŝymy, rycerze,
Wskros ęeste ciemnoŝci pobłyaska,
Jak gwiazda wŝród nocy od błędnych drŝg
Przewodnie promienie nam ciska. [strzeęe,
Juę nas nie przestraszą mar pełne ciemnoŝci,
Ni dola zbyt sroga, ni ŝwiat pełen złoŝci,
Gdyę prosta i pewna, a cała ŝwietlana
Przed nami lŝni droga wybrana.

Nie zbaczać! iŝć prosto wytknięta raz drogą!
Bądź kaędy odważny, wytrwały!
Pracując bez przerwy kropelki wszak mogą
Wyęłabiać granity i skały.
Z hasłami: nadzieja! cierpliwoŝć! zaparcie!
Po drodze tej daŝmy wciąę naprzŝd uparcie,
Aę wreszcie po znojach i trudach cnych wielu
Dotrzemy z tryumfem do celu!

Więc siejmy i trwajmy w mozolnym tym czynie
O przyszłe wciąę troszcząc się losy.
Choć ŝto ziarn przepadnie, choć tysiąc zaginie,
Nie traćmy nadziei na kłosy.
„Juę dosyć!” — niejeden z ŝzyderstwem zawŝła,
„Nie dosyć”, wam serce odpowie, „Wzwyż czoła!
Hej, naprzŝd! Dla wnukŝw wdzięcznoŝci, ko-
Ta siejba jest warta wytrwania”. [chania,

Jeęeli posucha, lub wicherŝw nawala
Listeczki więdące oderwie,
Dziękujmy tym wichrom, gdyż w uas odnŝlo-
Ku ŝyciu wzwyż siła się zerwie. [dniała
Nie wymrą juę nasi szlachetni rycerze,
Juę burza szalona nam sił nie odbierze —
Te kroki uparte, te walki gorące,
Do celu jednego daŝące.

Nie zbaczać! iŝć prosto wytknięta raz drogą!
Bądź kaędy odważny, wytrwały!
Pracując bez przerwy kropelki cud mogą:
Wydraęą granity i skały..
Z hasłami — nadzieja! cierpliwoŝć! zaparcie!
Po drodze tej daŝmy wciąę naprzŝd uparcie,
A kiedyŝ po znojach i trudach cnych wielu
Z tryumfem dotrzemy do celu.

Przełŝżył

Henryk Proŝwięłłowicz-Skinder.

Kronika. — Kroniko.

Ruch esperancki w Polsce.

Zeszły rok przyniósł dla sprawy naszej w Polsce bardzo obfite plony. Niestety, nie posiadamy jeszcze dość kompletnego materiału statystycznego, abyśmy już mogli dać zupełnie dokładne sprawozdanie o tym ruchu. Pomimo stale powtarzanych prośb o nadsyłanie nam niezbędnych wiadomości w tym kierunku, niewielka tylko część esperantystów polskich odpowiedziała na nasze wezwania. Korzystamy więc ze sposobności, by jeszcze raz wznowić naszą prośbę o nadsyłanie nam adresów Towarzystw i ich zarządów oraz oddzielnych esperantystów w Polsce. Bez tego materiału, wydawnictwo rocznika esperantystów polskich zmuszeni będziemy na czas długi odłożyć.

Jednak już i dziś możemy powiedzieć, że według otrzymanych informacji, działalność nasza w ciągu zeszłego roku przewyższyła nawet ruch esperancki niektórych mniejszych krajów, gdzie jeszcze do niedawna ruch ten był silniejszym, niż u nas.

Dziś liczymy już oficjalnie 14 Towarzystw, oprócz różnych większych lub mniejszych kółek we wszystkich trzech dzielnicach Polski. Liczba zarejestrowanych już u nas esperantystów przekracza 2,000. Cyfra ta jednak przedstawia tylko małą część rzeczywistej ich liczby, gdyż zawiera jedynie członków towarzystw oficjalnych. A nie na tym obliczeniu bynajmniej opieramy całą konkluzję o postępie sprawy naszej w Polsce. Argumenty o nim czerpiemy z zupełnie innego źródła, a mianowicie z obudzonego w naszym kraju przekonania o użyteczności języka międzynarodowego, czego dowodzi przedewszystkim wprowadzenie Esperanta do różnych szkół miejscowych. W tym najważniejszym dla nas kierunku sprawa nasza postępuje bardzo szybko naprzód. W ostatnich numerach „Esperantysty Polskiego“ zanotowaliśmy kil-

Pola esperantista movado.

La pasinta jaro liveris en nia lando tre bonan rikolton por nia afero. Bedaŭrinde, ni ankoraŭ ne havas kompletan materialon statistikan por doni tute precizan raporton pri tiu ĉi movado. Malgraŭ konstante ripetataj petoj alsendi al ni ĉiujn necesajn sciigojn en tiu ĉi rilato, nur negranda parto de polaj esperantistoj respondis al niaj alvokoj. Ni uzas tiun ĉi okazon por ankoraŭ unu fojon renovigi nian peton pri alsendo de adresoj de grupoj, iliaj estraroj kaj apartaj esperantistoj en Polujo. Sen tiu ĉi materialo la eldono de jarlibro de polaj esperantistoj estos por longe prokrastita.

Tamen jam hodiaŭ ni povas diri, ke laŭ la ricevitaj informoj, ni dum la lasta jaro sukcesis superi kelkajn landojn, en kiu esperanta movado antaŭ nelonge estis pli forta ol ĉe ni.

Hodiaŭ ni oficiale kalkulas jam 14 societojn, krom diversaj pli aŭ malpli grandaj rondetoj en ĉiuj tri regionoj de Polujo. La nombro de registritaj jam ĉe ni esperantistoj trapasas 2,000. Tiu ĉi cifero tamen prezentas nur malgrandan parton de efektiva nombro; ĉar ĝi enhavas nur membrojn de la oficialaj societoj. Kaj ne sur tiu ĉi kalkulo ni apogas nian konkludon pri la progreso de nia afero en Polujo. La argumentojn por ĝi ni ĉerpas el tute alia fonto, nome el vekita en nia lando konvinko pri la utilo de lingvo internacia, kiu elmontriĝis antaŭ ĉio en la enkonduko de Esperanto en diversajn lokajn lernejojn. En tiu ĉi direkto, kiu estas por ni plej grava, nia afero marŝas tre rapide antaŭen. En la lastaj numeroj de „P. E.“ ni notis kelkajn gravajn lernejojn en Varsovio kaj Krakovo, kiuj enkondukis konstantajn kursojn de Esperanto. Nun oni sciigas nin, ke en Lvovo

ka wybitnych szkół w Warszawie i w Krakowie, które wprowadziły stałe kursa Esperanta. Obecnie zawiadomiono nas, że we Lwowie p. Witold Skalski rozpoczął systematyczne kursa języka Esperanto w „Lwowskiej Szkole Handlowej“ z inicjatywy jej dyrektora, D-ra St. Lewickiego. Według dalszych naszych wiadomości, język Esperanto jest obecnie wykładany w 9 szkołach polskich, a jeżeli dodamy jeszcze do tego wielką liczbę kursów prywatnych, to przekonamy się, że sprawa języka Esperanto postępuje u nas naprzód zupełnie zadawalniająco.

W Siedlcach, siedzibie nowej filii Polsk. Tow. Esp., postanowili wkrótce wprowadzić Esperanto do swych szkół: p. Radliński i pani Barszczewska. W Łodzi nasi współideowcy wprowadzają również kursa do jednej ze szkół.

Ogólna propaganda rozwija się także z powodzeniem. Między innymi obudziło się znaczne zainteresowanie Esperantem wśród lekarzy polskich, którzy już w liczbie około 60 osób zapisali się do Wszechświatowego Esperanckiego Związku Lekarskiego i jak już notowaliśmy dawniej, założyli oddzielną Sekcję Lekarzy przy Polskim Towarzystwie Esperanckim. W Łodzi D-r Helman miał 12-go grudnia w tamtejszym Towarzystwie Dentyścycznym odczyt o znaczeniu języka Esperanto dla dentystów. Rezultatem tego było, że wielu dentystów zainicjowało w swem gronie kurs Esperanta.

Idea języka międzynarodowego rozwija się wśród naszych ziomków nie tylko w Polsce, ale zarówno i w krajach obcych w pośród różnych kół polskich, a przede wszystkim wśród studentów. W ostatnich czasach np. powstało także Koło Esperantystów przy polskim Towarzystwie Studenckim „Ogniwo“ w Zurichu. Wiadomość o tym zainteresuje niewątpliwie naszą młodzież, która w znacznej liczbie wychodzi zwykle do tego miasta na studia uniwersyteckie. Adres wspomnianego koła: Zurich, Pola Studenta Societo „Ogniwo“, Sonneggstr., 2.

— 7 grudnia r. b. odbyło się ogólne miesięczne zebranie „Polskiego To-

S-ro Vitold Skalski komencis sistemajn kursojn de Esperanto en „Lvova Komerca Lernejo“ danke al iniciato de ĝia direktoro D-ro St. Lewicki. Laŭ la ricevitaj de ni informoj Esperanto nun estas instruata en 9 lernejoj. Se ni aldonos al tio ĉi multenombrajn privatajn kursojn — ni konvinkigos, ke la afero marŝas ĉe ni tute kontentige antaŭen.

En Siedlce, nova filio de „Pola Esp. Soc.“, decidis baldaŭ enkonduki Esperanton en siajn lernejojn: S-ro Radliński kaj S-ino Barszczewska. En Łódź niaj samideanoj ankaŭ sukcesis enkonduki kursojn en unu lernejon.

La ĝenerala propagando disvolviĝas ankaŭ kun sukceso. Interalie vekigis sufiĉe granda intereso por Esperanto inter polaj kuracistoj, kiuj jam en granda nombro ĉirkaŭ 60 personoj, enskribiĝis en la Tutmondan Esp. Kuracistan Asocion kaj, kiel ni jam notis antaŭe, fondis apartan sekcion de kuracistoj ĉe la „P. E. S.“. En Łódź D-ro Helman havis la 12-an de Decembro parolon pri la signifo de Esperanto por dentkuracistoj en la loka dentista societo; la rezultato estis sukcesa, ĉar multaj dentkuracistoj iniciatis inter si kurson de Esperanto.

Nia afero disvolviĝas inter poloj ne nur en Polujo, sed ankaŭ en eksterlando inter diversaj polaj rondoj, precipe inter studentoj. En la lasta tempo fondiĝis tia rondo de Esperantistoj en Zurich, ĉe la pola Studenta Societo „Ogniwo“. Tiu ĉi fakto estos sendube interesa por nia junularo, kiu granda nombro veturas en tiun ĉi urbon por universitataj studoj. La adreso de tiu ĉi rondeto estas Zurich, Pola Studenta Societo „Ogniwo“, Sonneggstr. 2.

— La 7-an de decembro okazis ĝenerala monata kunveno de „P. E. S.“ S-ro St. Essigman parolis pri la esenco de Esperanto kaj S-ro T. Matuszewski prezentis al la kunvenintoj la daŭrigon de lumbildoj el la Drezdena kongreso.

warzystwa Esperanckiego". P. Stanisław Essigman mówił na nim o treści języka Esperanto, a p. Tomasz Matuszewski przedstawił zebranym dalszy ciąg niksujących obrazów z kongresu drezdeńskiego.

Kronika powszechna.

Anglja. Ruch esperancki w Anglii, bodaj czy nie przewyższył już ruchu w krajach innych. Stało się to zaś dzięki podziwu godnej, systematycznej i niezmordowanej propagandzie. Wszyscy esperantyści, którzy w tych czasach zwiedzali Anglię, świadczą jednoznacznie o szybkim tam rozwoju języka Esperanto. Ostatniego miesiąca urządzono liczne zebrania esperantystów w Londynie i innych miastach. W Edyngburgu zorganizowano wielką uroczystość, w której wzięło udział 2000 osób. W tymże mieście odbywa się 14 kursów tygodniowo. Urządzono też z powodzeniem publiczne zebrania w Liverpool, przy Uniwersytecie, w Bladford, w Derby, w Dyrekcji wielkiej, kolejowej kompanji Midlandzkiej, w Norwich, St. Helens, Newcastle i w innych miastach.

Na wyspie Ceylon powstało Towarzystwo Esperanckie. W Tigi i Benares (Indje) zorganizowano systematyczne kursa. Redakcja „British Esperantist“ (133, High Holborn, London W. C.) organizuje bardzo zajmującą ankietę dla wystawy propagacyjnej. Esperantyści proszeni są o nadsyłanie kart z oznajmieniem: 1) dlaczego uczyli się Esperanta, 2) co najwięcej cenią w Esperantyzmie, oraz 3) wyraźnie skreślone nazwisko i adres.

Francja. Nasz niezmordowany propagator p. E. Privat, odbywa teraz pod patronatem Francuskiego Towarzystwa Esperanckiego wielką podróż przez Francję północną. Rezultatem tej podróży jest powstanie w różnych miastach nowych Towarzystw i kursów.

W lokalu „Francuskiego Towarzystwa Geograficznego“ w Paryżu, p. Edward Bakheuser, prof. Politechniki w Rio Janeiro, miał po esperan-

Nia estimata kunredaktoro S-ro *Adam Zakrzewski*, membro de la Lingva Komitato, estas nomita Direktoro de la urba statistika oficejo en Varsovio.

Diverslanda kroniko.

Anglujo. La esperanta movado en Anglujo ŝajne superis jam la movadon en aliaj landoj. Tion oni devas danki al la mirinde sistema kaj senlaca propagando. Ĉiuj esperantistoj, kiuj vizitas Anglujon, egale atestas la rapidan disvolviĝon de Esperanto en tiu ĉi lando.

La lastan monaton estis aranĝitaj multaj diversaj kunvenoj en Londono kaj aliaj urboj. En Edinburg estis organizita granda festo, en kiu partoprenis 2000 personoj. En tiu ĉi urbo ĉiusemajne okazas 14 kursoj. Sukcesaj publikaj kunvenoj estis aranĝitaj en Liverpool, ĉe la Universitato, en Bladford, en Derby, ĉe la direkto de la granda Midlanda Fervoja Kompanio, en Norwich, St.-Helens, Newcastle kaj aliaj urboj.

En Ceylon estas fondita esperanta grupo. En Tigi kaj Benares (Hindujo) estas organizitaj sistemaj kursoj. La Redakcio de „British Esperantist“ (133, High Holborn, London W. C.) organizas tre interesan enketon por propaganda ekspozicio. Esperantistoj estas petataj skribi sur la alsendotaj kartoj: 1) kial ili lernis Esperanton, 2) kion oni plej ŝatas en Esperantismo kaj 3) nomon kaj adreson klare skribiton.

Francujo. Nia senlaca propagandisto S-ro E. Privat faras nun grandan vojaĝon tra la norda Francujo sub la patronado de la „Franca Societo por propagando de Esperanto“. La rezultato de tiu ĉi vojaĝo estas—apero de novaj societoj kaj kursoj en diversaj urboj.

En la sidejo de la „Franca Societo de Geografio“, en Parizo, S-ro Everardo Bakheuser, profesoro de la Politeknika Lernejo en Rio Janeiro, havis

cku mowę o „Brazyliji, jej rozwoju, organizacji i przyszłości“. Przewyższał p. Gabryel de Piza, brazylijski minister pełnomocny we Francji.

Ukazały się tu nowe czasopisma esperanckie: „*Franca Esperantisto*“, organ francuskiego Towarzystwa dla propagandy Esperanta, „*Le Monde Esperantiste*“ zamiast: „*L'Etoile Esperantiste*“ i „*Norda Gazeto*“ organ „*Federacjii Francjii Północnej*“.

Belgia. Międzynarodowy kongres dentystów w Brukseli, przyjął jednogłośnie propozycję D-ra Cunnigham, by uznać Esperanto, za oficjalny język kongresu. W Antwerpii założono pod prezydencją rektora Uniwersytetu w Dijon, prof. E. Boirac'a, międzynarodowe Towarzystwo Psychologów. Sekretarz Aug. Stas, 25, rue St. Antoine, Antwerpja.

W Malines gorliwy nasz współideowiec ksiądz Richardson, na wezwanie arcybiskupa kardynała Mercier, miał 10 Grudnia w miejscowym seminarjum, wobec bardzo licznie zebranego duchowieństwa, uczniów seminarjum i dygnitarzy miejskich — mowę o języku Esperanto.

Wyszła tu właśnie broszurka zawierająca adresy więcej niż 150 katolickich księży-esperantystów. Dowodzi to najlepiej jaką sympatię obudził język Esperanto między duchowieństwem tutejszym.

W Belgji też zaczęło wychodzić nowe czasopismo „*Belga Esperantisto*“, pod redakcją panów: L. Champy, Fr. Schoofs, van der Biest-Andelhof, L. van Laere i Oskar van Schoor. Pierwszy numer zawiera bardzo bogatą i zajmującą treść. Czasopismo to powstało zamiast organu belgijskiej Ligi Esperanckiej: „*Belga Sonorilo*“.

Niemcy. Królewskie Saksońskie Ministerjum specjalnym reskryptem z 12 Listopada, zezwoliło na założenie „*Saskiego Esperanckiego Instytutu*“. Reskryptem tym mianowany został dyrektorem Instytutu, znany nasz współideowiec Dr. Schramm. Kursy Esperanta odbywają się w szkołach i w Parlamencie. Jak pisaliśmy już dawniej,

esperantan paroladon pri „Brazilujo, ĝia kreskado, organiziĝo kaj estonteco“. Prezidis S-ro Gabrielo de Piza plenpotenca ministro de Brazilujo en Francujo.

Aperis novaj esperantaj gazetoj: *Franca Esperantisto*, organo de la „*Franca Societo por propagando de Esperanto*“, *Le Monde Esperantiste*, anstataŭ „*L'Etoile Esperantiste*“ kaj *Norda Gazeto*—la organo de la Federacio de Norda Francujo“.

Belgujo. La Internacia kongreso de dentistoj en Brukselo akceptis unuvoĉe proponon de D-ro Cunnigham alpreni Esperanton kiel oficialan kongresan lingvon.—En Antverpeno estas fondita „*Esperanta Psikistaro*“ — internacia societo de psikistoj; sekretario Aŭg. Stas, 25, rue St. Antoine, Antverpen.—En Mehleno nia fervora samideano S-ro Abato Richardson, laŭ la invito de la ĉefepiskopo S-ro Kardinalo Mercier, faris la 10-an de Decembro en la Seminario parolon antaŭ granda aro da pastroj, seminarianoj kaj laikaj eminentuloj.

Eliris ĉi tie broŝureto kun la nomaro de katolikaj esperantistaj pastroj, enhavanta pli ol 150 nomojn. Ĝi montras, kian simpatian vekis Esperanto inter la loka pastraro.

Komencis eliri nova gazeto „*Belga Esperantisto*“ sub la redaktado de S-roj L. Champy, Fr. Schoofs, van der Biest-Andelhof, L. van Laere kaj Oskar van Schoor. La unua numero enhavas tre riĉan kaj interesan materialon; ĝi anstataŭas la antaŭan organo de „*Belga Ligo Esperantista*“ (*Belga Sonorilo*).

Germanujo. La reĝa Saksa Stata Ministraro donis per speciala reskripto de la dekdua de Novembro permeson por la fondo de la *Saksa Esperanta Instituto*; tiu ĉi reskripto nomas nian konatan samideanon asesoron D-ror Schramm—direktoro de tiu ĉi instituto.

La kursoj havas lokon en lernejoj kaj en la parlamentejo. Kiel ni skrib-

Instytut cieszy się niezwykłym powodzeniem, a posiada już zapisanych więcej niż 1500 uczniów. I wogóle w Niemczech idea nasza po kongresie drezdeńskim rozwija się coraz szybciej.

Przesąd więc, że jakoby Niemcy są przeciwni idei języka międzynarodowego — okazuje się bezpodstawnym.

W „Eho Esperantista“ (Berlin, 1908. № 30) wydrukowano mowę adwokata Schiffa, prezesa Berlińskiej grupy Esperantystów, wypowiedzianą w ratuszu berlińskim na zebraniu uczestników kongresu drezdeńskiego, którzy zwiedzili Berlin po kongresie. Powtarzamy tu niewielki ustęp z tej mowy:

„Cesarstwo niemieckie, w którego stolicy goście i którego siłę, wielkość i jedność podziwiacie, było do niedawna rozdzielone na wiele, wiele państw i państweczek i liczne były granice pomiędzy niemi. Obecnie wspólny łącznik zjednoczył je. Indywidualność różnych części jednak nie znikła. Bawarczyk i Meklemburczyk dzisiaj korzystają ze swej indywidualności tak samo, jak i przedtym. Ale pomimo to, jedność ojczyzny przynosi wszystkim obywatelom wiele dobrego i wielką pomoc. Niech więc Niemcy będą pouczającym dla nas przykładem. Jesteśmy i chcemy pozostać Niemcami... członkami naszej własnej ojczyzny. Chcemy rozwijać naszą ojczystą indywidualność, nasz język ojczysty, ale jednocześnie chcemy połączyć różne ludy przez wspólny łącznik. Nasz cesarz powiedział: „Czasy nasze stoją pod znakiem stosunków wzajemnych“. Potrzeba wspólnego łącznika, wspólnego języka międzynarodowego tak jest wielka, że wkrótce, mam nadzieję, nie będziemy mogli wprost sobie wyobrazić, jak można było przedtym żyć bez Esperanta“.

Widzimy więc, że gorący patryjoci, nawet niemieccy, uwielbiający siłę i wielkość germańskiego imperjum, opierający się na słowach germańskiego cesarza, są jednak jednocześnie niemniej gorącymi Esperantystami.

is jam, la instituto havas grandan sukceson, ĉar en la komenco jam enskribiĝis pli ol 1500 lernantoj. En Germanujo ĝenerale nia afero post la Drezdena kongreso rapide disvolviĝas. La antaŭjuĝo, ke la germanoj estas kontraŭaj al la ideo de lingvo internacia montriĝis senbaza.

En „Eho Esperantista“ (Berlin, 1908. № 30) estas enpresita parolado de S-ro advokato Schiff, prezidanto de la Berlina Esperantista grupo, dum la kunveno en Berlina urba domo de drezdenaj kongresanoj, kiuj vizitis Berlinon post la kongreso. Ni ripetas tie ĉi malgrandan eltraĵon el tiu ĉi parolado:

„La germana imperio, en kies ĉefurbo vi estas gastoj, kies forton, kies grandecon kaj unuecon vi admiras, estas antaŭ nelonge disigita en multajn, regnojn kaj regnetojn, kaj multnombraj estis la limoj inter ili. Nun komuna ligo ligas ilin. La individueco de la diversaj partoj de la lando ne malaperis. La Bavaro kaj la Meklemburgano hodiaŭ ĝuas sian individuecon en la sama maniero, kiel antaŭe. Sed malgraŭ tio la unueco de la patrujo por ĉiuj landanoj alportis grandan bonon kaj helpon. Estu Germanujo por ni instruĉa ekzemplo. Ni restos kaj ni volas resti germanoj... anoj de nia propra patrujo. Ni volas ĝui nian patrujan individuecon, nian patrujan lingvon, sed samtempe ni volas kunligi diversajn naciojn per komuna ligo, per nia Esperanta lingvo. Nia imperiestro diris: „Nia tempo staras sub la signo de interkomunikaĵoj“. La neceseco de komuna ligo, de komuna internacia lingvo estas tiel granda, ke baldaŭ, mi esperas, ni ne povos preskaŭ imagi, kiel estis ebla antaŭe vivi sen Esperanto.

Ni do vidas ke varmaj patriotoj, eĉ germanoj, — admirantaj forton kaj grandecon de germana imperio, apogantaj sin sur la vortoj de l'germana imperiestro, — estas samtempe ne malpli varmaj esperantistoj.

Rozmaitości.

Powstały, oprócz wyżej cytowanych, następujące nowe pisma:

Norweska Esperancka Gazeta (Styczeń) — Kristiania, Sondregt. 4; redaktor: E. Schilbye, Bergen.

Notatki Esperanckie (Grudzień). Redaktor: Giovanni Castiglia. Palermo (Włochy), via s. Agostino № 6.

Stałą rubrykę o Esperancie i w języku Esperanto otworzyły:

